

Leterujo : 7-a parto kaj skiferioj en Adelboden
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 484, 1973.01.17 & 20

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Dum pluraj semajnoj ni babilis kun niaj geaŭdantoj, respondante al leteroj kaj poŝtkartoj venintaj el 28 landoj. Hodiaŭ ni konkludas tiun rendevuon kun niaj radio-geamikoj. En Pollando ni salutas sinjoron Tadeo Kania en Sosnowiec, sinjoron Bieliński en Bydgosz kaj sinjoron Tomasz Chmielik en Swidnik.

Estas malfacile al ni scii, ĉu tiuj geaŭdantoj rekonas sian nomon sub nia prononcmannerio. Estus bone, ke post la normala ortografia skribo de sia nomo ĉiu esperantisto poste provu doni kiel eble plej proksiman esperantan transskribon. Tion faras angloj, kaj ni opinias, ke ili pravas.

En Portugalio ni salutas sinjoron M. Pimenta en Coimbra kaj sinjoron Nonato Almeida en Aljustrel-Baixo Alentejo.

En Rumanio ni salutas sinjoron Ion Sirbu en Brasov.

En Sovetio ni salutas sinjoron Eduards Dancis en Valmiera, Latvio. En Svedio ni salutas sinjoron Gunnar Birgersson en Huskvara, sinjoron Lennart Aberg en Gotenburgo, sinjoron Erik Sward en Malmo, sinjoron Harald Fingalsson en Huskvara kaj sinjoron C. Aldston en Karlsterona.

En Usono ni salutas sinjoron H. Ver Ploeg en Spokane, en la ŝtato Washington kaj sinjoron Lewis Cook en Circleville en la ŝtato Ohio.

Restas al ni saluti kelkajn svisajn geaŭdantojn. El Vevey ni ricevis salutojn de sinjoro Aldo Dutto, kiu ŝatus povi aŭskulti nin pli longe kaj pli ofte. En Giubiasco ni salutas sinjoron Kurt Greutert, la lerta organizinto de la fervojista kongreso, pri kiu ni raportis siatempe. Ni ankoraŭ salutas sinjoron Jean Rufer en Bem, gesinjorojn Gerard kaj Florence Cool-Côté en Goldem kaj sinjoron Josef Tomaszczyk en Ĝenevo.

Dum ni estas en la monato januaro, ni volas diri kelkajn vortojn pri la 16-a Esperantista Skiferio, kiu disvolviĝis en Adelboden de la 26-a de decembro 1972 ĝis la 5-a de januaro 1973.

21 geesperantistoj el Belgio, Britio, Francio, Germanio okcidenta, Hungario, Italio, Nederlando kaj Svislando partoprenis tiun sportan aranĝon. Estis do vere intemacia renkontiĝo.

Per iom da reklamo ni certe povus esti pli multnombraj, sed tion ni ne celadas. Kion ni serĉis jaron post jaro organizante tiun skiferion, tio estis grupigi dudekon da gesamideanoj por komuna vivo dum deko da tagoj. Car ni vivas en mezkomforta ĉaledo kaj devas mem plenumi la mastrumadan laboron, tuj formiĝas speco de familia astmosfero. Ĉiu ricevas funkcion daŭran, kiel okupiĝi pri la aĉetoj, pri la laktoserĉado, pri la pretigo de la piknikoj por la ekskursaj tagoj, dum la aliaj ricevas ĉiutage alian funkcion : purigado de la duŝejoj, lavado de la manĝilaro, ordigado de la domo, kaj tiel plu. Kuiristo okupiĝas pri la pretigado de la manĝoj kaj profesorino pacience instruas la skiadon al grupoj de skiantoj, por ke ili fariĝu veraj ĉampionoj. Ambaŭ tiuj funkciuloj estas esperantistoj.

Kiel en sportaj medioj oni kutimas sin levi frue por povi profiti skii kiel eble plej longe. Ĉijare la neĝo ne abundis, tamen skiado pli mapli ĉiam estis ebla. La suno konstante beligis la alpan pejzaĝon.

Post la matenmanĝo kaj plenumado de ĉiuj deĵoraj funkcioj la skiantoj grupiĝas antaŭ la ĉaledo. Formiĝas grupoj laŭ la skikapablo : komencanta grupo, mezforta grupo, lerta grupo.

Iujn tagojn ni skiadas ĉirkaŭ la ĉaledo. 4 skiliftoj estas je nia dispono. Du por la komencantoj, du por la bonaj skiantoj. Kiam ni restas en Adelboden, ni tagmanĝas en la ĉaledo. Bona varma supo, simpla manĝo atendas la malsatantojn. Kaj posttagmeze formiĝas aliaj grupoj. Kelkaj deziras daŭre skii. Aliaj volas sketi aŭ promeni aŭ viziti la magazenojn de la vilaĝo. Al ĉiu laŭ sia gusto.

Aliaj tagoj estas dediĉitaj al ekskursoj. Ĉu piede, ĉu aŭtomobile, ĉu per aŭtobuso, la tuta grupo forveturas al alia valo, kaj per telferoj alsupras ĝis pli ol 2000 metroj. Partoprenanto portas pezan dorsosakon, kiu entenas la piknikaĵojn. En montara restoracio ni rendevuas por manĝi varman supon kaj malkovri, kio estas en la tornistro. Kaj la skiado daŭriĝas. Skiado en mirindaj pejzaĝoj ĉe la piedo de altaj rokaroj, de glaciejoj. Skiado sur preskaŭ senfinaj deklivoj.

Vespere la ekskursantoj revenas en la ĉaledon, kiam noktiĝas. Bona duŝo. Bona manĝo. Kaj ĉiuj estas pretaj por komuna vespero. Ludoj, babiladoj, prezento de filmo aŭ de diapozitivoj, jen la ĉefaj okupoj, kiam ne estas festa vespero.

Ni raportis pri tiu skiferio en la as-tempo, ĉar jaron post jaro ĝi disvolviĝas en la sama etoso. Kreiĝis kutimoj. Ekzemple la silvestra festo ne daŭras dum la tuta nokto, ĉar la unuan de januaro aŭtobuso jam atendas la skiantojn je la oka horo kaj duono. Kial ne profiti skii, kiam sur la skiadejoj ni estas preskaŭ la solaj! Alia tradicio estas la tipe svisa manĝo nomata fonduo. Temas pri fromaĝo fandita en blanka vino. Ĉiuj ŝategas tiun kamparanan manĝon, kiu naskas ĝojigan atmosferon.

Se vi deziras foje esti inter la 25 privilegiitoj de la Esperantista Skiferio en Adelboden, petu la programon de la venonta 17-a restado al Svisa Radio, Esperanto-fako. Ĝi disvolviĝos kiel kutime de la 26-a de decembro ĝis la 5-a de januaro.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !